

O BRASIL ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 15-16 (297-298)

Março-Abril 1939

Redator responsável:
Dr. Carlos Domingues

Administração e redação:
Praça da República, 54.
Rio-de-Janeiro, Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondukuponoj.

CINEMA E ESPERANTO

Alguns diálogos em Esperanto em um film de grande metragem



CLARK GABLE E NORMA SHEARER FAZEM UM BRINDE
AO MOVIMENTO ESPERANTISTA

Dentro de pouco tempo será exibido no Brasil com o nome de "Este mundo louco" o film confeccionado pela Metro-Goldwin-Mayer denominado "Idiot's Delight", que contem alguns diálogos em Esperanto.

A direção geral do film esteve a cargo do Sr. Clarence Brown, mundialmente conhecido pelo extraordinário êxito que tem tido os films por ele dirigidos. Os principais papeis foram confiados aos famosos artistas Clark Gable e Norma Shearer, cujas fotografias ilustram nosso artigo.

Os diálogos em Esperanto foram controlados pelo conhecido esperantista

americano Sr. Joseph R. Scherer, presidente da Associação Esperantista dos Estados Unidos e autor do excelente livro "Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo". Pessoas que assistiram à exibição do film são unânimes em afirmar a correção da pronúncia da língua auxiliar.

Alem dos artistas que no film fazem os principais papeis figuram os seguintes, que são também conhecidos: Edward Arnold, Pat Paterson, Joseph Schildkraut, Burges Meredith e Laura Hope Crews.

O Sr. Clarence Brown ficou muito admirado da volumosa correspondência

recebida em Esperanto, mais de 2000 cartas e cartões vindos de todas as partes do mundo! Em geral os remetentes enviaram felicitações pelo uso do Esperanto e prometeram assistir à exibição do film em companhia de sua família e de amigos e fazer larga propaganda pela imprensa.

O Sr. Brown mostrou a correspondência recebida ao pessoal da M. G. M. e aos colegas de outras empresas, fazendo assim uma bela propaganda do Esperanto nos meios cinematográficos.

À vista do elevadíssimo número de cartas e cartões recebidos, não poderá o Sr. Clarence Brown cumprir o que prometera, isto é, responder pessoalmente a todos os remetentes. Entretanto, já providenciou para que toda a correspondência recebida seja respondida por funcionários da M. G. M.

Recomendamos a todos os esperantistas brasileiros que façam propaganda do film por todos os meios, pela imprensa local, na roda de seus parentes e amigos, etc. Não devem, porem, exagerar, dizendo, por exemplo, que se trata de um film falado em Esperanto, porque poderia supor-se que ele é todo falado na língua auxiliar, o que não é possível nem conveniente no momento atual. Um film nestas condições só aos esperantistas interessaria atualmente. O nosso fim é mostrar ao grande público que o Esperanto é uma língua agradável ao ouvido e poderá em um futuro próximo substituir com vantagem e economia os idiomas nacionais nos films de interesse mundial.

ESPERANTISTA DEVO: Varbu unu novan esperantiston 1939!

La Esperanto en "Idiot's Delight" estas bonega

Dum la lastaj semajnoj la B.E.A. estas en amika kontakto kun la angla filio de Metro-Goldwyn-Mayer pri la filmo, "Idiot's Delight", kun la celo orientigi pri propagando, kaj ni jam ellaboris kelkajn planojn tiusece. Ankaŭ okazis interŝanĝoj de ideoj kun niaj francaj esperantistoj, kiaj simile faras en Francujo.

Antaŭ kelkaj tagoj okazis en Londono la privata monstro de la filmo, kiun mia edzino kaj mi havis la privilegion ĉeesti. Verŝajne, do, ni estas la unuaj eŭropanoj vidi la filmon, kaj kun granda plezuro ni povas raportoj, ke la nivelo de elparolo estas mirinde alta. Kiam la unuaj esperantaj vortoj aŭdiĝis, ni apenaŭ povis kredi je niaj oreloj, tiel internacieca estis la prononcado. Oni devas memori, ke la cetera parto de la filmo estas parolata en la angla lingvo kun usona nuanco, kiu, kvankam neniel malplaĉa, estas samtempe rimarkeble ne la prononco kiu estas ĉiutaga en Anglujo. Do, des pli frapa estis la konstato, ke dum la angla lingvo ne estis tute la nia, la esperanta fakte estis vere nia propra nemiskompreneble internacia lingvo. Tuj ni sentis nin absolute hejme!

Kiel jam raportite, la kvanto de Esperanto estas malgranda. Tio memkompreneblas. Ĝi nur servas por doni "lokan koloron" al kelkaj scenoj, kaj pli multe da Esperanto enuigas la grandan neesperantistan publikon. Sed, la vera natureco de la konversacio, kaj la klareco pli ol emfazas la taŭgecon de nia lingvo. Kiel senŝanceliĝa kredanto je nia lingvo mi estas pli ol konfirmata pri ĝia kapablo esti filmilingvo. Ni devas vere gratuli al la aktoroj kaj ilia "konsilanto", s-ro Scherer, pro la perfekte kompetenta maniero, en kia ili aplikas la lingvon.

La unua monstro al la publiko okazos post tri/kvar semajnoj en Londono, kaj ĝenerale tra Anglujo dum la fruautuno.

S. D. Durrant.

El "*Heroldo de Esperanto*" kaj "*Esperanto Internacia*"

Stranganĝaj petoj venis de kelkaj gesamideanoj. Iuj volis tuj-tuj veni al Hollywood. Kelkaj sendis fotografaĵojn de siaj familianoj, aŭ de siaj favorataj hundoj kaj katoj.

Kelkaj samideanoj skribis 3-5-10-paĝajn leterojn kun babilado pri la tuta familio aŭ pri la glora historio de siaj patrolandoj. Aliaj rakontis kiom da lernejoj estas en la lando, kiom da poetoj, aŭ kiom da bibliotekoj. Film-

GRAVA ALVOKO

GEESPERANTISTOJ!

La konataj okazintaĵoj de la lasta tempo kaŭzis, ke denove nia Movado perdis en kelkaj landoj kaj regionoj amason da bonaj, fervoraj kaj agemaj adeptoj kaj laborantoj por la ideo de la internacia lingvo. Tiun ĉi pli ol dolorigan fakton ni bedaŭrinde ne povas ŝanĝi, ĉar ĝi superas niajn fortojn kaj troviĝas ekster nia povo.

Tamen, ĝuste tial, estas urĝe necese, ke ni ĉiuj ekagu ankoraŭ pli intense, energie, ofereme kaj unuece en tiuj landoj, kie ni havas plenan aŭ almenaŭ partan agadliberecon. Tion ĉi postulas de ni ne nur la interesoj de la Esperantismo, sed ankaŭ la kulturo kaj progreso de la tuta homara socio, al kiu ni deziras helpi pere de la internacia lingvo.

Kvankam en la privata vivo ĉiu el ni havas sian propran opinion pri la solvmaniero de la gravaj demandoj kaj problemoj, premantaj la hodiaŭon, kvankam ĉiu el ni havas siajn proprajn mondrigardon kaj ideologion, kaj eĉ rilate al la socia rolo de la internacia lingvo niaj opinioj kelkfoje eble malsamas, tamen ni ĉiuj havas unu tre fortan deziron kaj unu grandan celon:

LA PROGRESON KAJ FINANVENKON DE ESPERANTO

Ne ekzistas, do malhelpo, ke surbaze de tiu ĉi celo ni ĉiuj komune kaj amike kunlaboru por atingi ĝin kiom eble plej baldaŭ. Tial ni turnas nin al vi ge-Esperantistoj tra la tuta mondo:

Subtenu viajn Esperantistajn organizojn, viajn klubojn kaj societojn,

reĝisoro ne havas tempon por legi kiom da rozoj aŭ florbrasikoj kreskas tie em fora lando.

Kelkajn leterojn mi devis preni hejmen kaj kaŝi por eviti malbonan impreson pri la esperantistoj.

Mi petis ke oni sendu gratulojn pro la uzo de Esperanto kaj promesu fari vastan reklamon por la filmo. Sed oni ne diru en tiaj leteroj ke oni skribas "laŭ la peto de s-ro Scherer". Leteroj devas esti spontaneaj.

Bedaŭrinde kelkaj gesamideanoj "informis" s-ron Brown ke pro la filmo Esperanto multe profitos. *Kial dirition?* M.G.M. tion jam suspektis. Sed M.G.M. ne uzis Esperanton por fari propagandon por Esperanto!

Feliĉe 90 % de la skribintoj ĝuste diris ke pro la uzo de Esperanto la filmo

viajn landajn kaj fakajn asociojn. Aparte subtenu la plej grandan kaj plej fortan, vian kaj nian.

INTERNACIAN ESPERANTO-LIGON

Ĝia neŭtraleco ebligas al ĉiu membriĝi.

Ĝia demokrateco garantias al ĉiu plene libere esprimi sian opinion kaj tiamaniere influu la gvidadon de la Movado.

Ĝiaj taskoj kaj celo estas samtempe ankaŭ viaj.

Aligu, do, multnombre, ĉiuj senŝecpe, al ĝi, ĉar I. E. L. bezonas vin kaj vian moralan helpon precipe en la hodiaŭa kriza kaj malluma epoko. Memoru bone, ke subtenante I. E. L. ou, vi subtenas la Movadon kaj progresigas la Esperantismon.

Eble vi ne povos rimarki tujan rezulton de via subteno, sed estu certaj, ke via laboro pli aŭ malpli frue donos bonajn fruktojn, ĉar post la malluma nokto devas sekvi ankaŭ hela tago.

Optimisme kaj kurage antaŭen!

UNUECO ESTAS PORTO!

Por la

Internacia Esperanto-Ligo,

Prezidanto: Int.-Generalo L. Bastien, Paris.

Vicprezidanto: E. Malmgren, Stockholm.

Estraranoj: D-ro P. Kempeneers, Bruxelles.

D-ro I. Lapenna, Zagreb.

A. C. Olivier, London.

profitos, ĉar la esperantistoj de la mondo faros reklamon tre vastan por la filmo. *Ili saĝe diris ke Esperanto helpas al la filmo*, laŭ teknika vidpunkto kaj certigante por ĝi pli grandan financon sukceson. Tion la filmfarejo ŝatas aŭdi.

(Pli poste ni povos skribi ke ni vidis la filmon kaj ke ĝi tre plaĉis precipe pro la Esperantaj dialogopartoj.)

Ne fanfaronu pri la filmo en leteroj kaj ĉe geamikoj!

Ne parolu pri "Esperanto-filmo"! Prefere parolu pri "Gable-Shearer filmo kun Esperantaj dialogo-partoj". Ankaŭ ne postulu ke tuj ĉiuj filmoj parolu Esperanton ekskluzive!

El letero de s-ro Joseph R. Scherer en "Heroldo de Esperanto" kaj "Esperanto Internacia."

RADIO KAJ ESPERANTO

Kiel antaŭe dirite, S-ro Oswaldo Diniz Magalhães, kiu majstre direktas la gimnastikan kurson ĉiutage disradiatan de la potenca stacio de "Sociedade Radio Nacional" PRE-8, en Rio-de-Janeiro, trovas ĉiam okazon propagandi Esperanton. Multfoje li, dum siaj lecionoj, aŭdigis la esperantistan himnon, kiun li mem kantis. Tiam liaj gelnantoj, en siaj hejmoj, marŝis laŭ la takto de ĝia muziko.

Post la malfermo de la kurso speciale malfermita de "Brazila Klubo Esperanto" por siaj gelnantoj S-ro Magalhães diversfoje parolis pri ĝi kaj en la monato Aprilo dum la intertempo inter siaj du ĉiutagaj lecionoj la stacio disradiis kelkajn diskojn kun kantoj en Esperanto.

Niajn korajn dankojn al S-ro Oswaldo Magalhães kaj al la direktantaro de PRE-8!

Bela propagando por Esperanto okazis ĉe la stacio de "Radio Clube do Ceará", PRE-9, kies sidejo estas en Fortaleza, ĉefurbo de ŝtato Ceará.

La lernantinoj de unu el la kursoj de Esperanto direktataj de d-ro Demócrito Rocha, delegito de IEL en Fortaleza kaj direktoro de la gazeto "O Povo", faris al sia instruisto agrablegan surprizon je la tago de lia naskiĝa datreveno, okazinta la 14an de Aprilo.

Ricevinte de s-ro João Dammar, direktoro-posedanto de tiu radioklubo, ĝentilan permeson por horvarona Esperanto-disradiado tiuj junulinoj, kiuj estas ankaŭ aninoj de "Katolika Esperantistina Grupo", ĵus fondita, organizis interesan programon, kiun d-ro Demócrito Rocha, hejme, ĉirkaŭita de siaj familianoj kaj amikoj, plezure aŭdis.

Funkciis kiel radiparolistino f-ino Bia Evangelista. Faris la salutan paroladeton f-ino Neusa Vieira Nepomuceno, ŝtata instruistino. Poste f-ino Maria Stael Porto, delegitino de IEL por katolikaj aferoj, kantis la "Kanton de l'Ekzilo", laŭ poezio de l' fama poeto Gonçalves Dias tradukita de S-ro V. Lorenz kaj muziko de nia neforgesebla samideano Quirino de Oliveira. Sin akompanis per fortepiano ŝia fratino f-ino Maria Zeneide Porto.

La disradiado finiĝis per la esperantista himno "La Espero" kantita de la aninoj de P katolika grupo. Ilin akompanis per fortepiano f-ino Maria Zeneide Porto.

Al s-ro João Dummar la prezidanto de Brazila Ligo Esperantista letere sendis koran dankon, kiun ni nun plezure ripetas.



POŝTKARTOJ ELDONITAJ DUM LA INTERNACIA FILATELIA EKSPOZICIO "BRAPEX"

Poŝtkartoj venditaj dum la Ekspozicio 1.100

Poŝtkartoj senditaj ĝis 31-4-39:

- 1. Nederlando 35
- 2. Germanujo 14
- 3. Britujo 14
- 4. Francujo 12
- 5. Svedujo 10
- 6. Brazilo 9
- 7. Ĉekoslovakujo 8
- 8. Usono 8
- 9. Javo 8
- 10. Danujo 8
- 11. Hungarujo 7
- 12. Svisujo 4
- 13. Transvaalo 4
- 14. Finnlando 3
- 15. Polujo 3
- 16. Beĝujo 2
- 17. Jugoslavujo 2
- 18. Australio 2
- 19. Italujo 2
- 20. Kanado 2
- 21. Novzelando 2
- 22. Norvegujo 2

161 161

1.261

SOCIETO DE GEOGRAFIO DE RIO-DE-JANEIRO

Jam aperis la 45a Volumo de la "Revista da Sociedade de Geografia do Rio-de-Janeiro", oficiala organo de la Geografia Societo de Rio-de-Janeiro, rilata al la jaro 1938, kiu enhavas, kiel la antaŭaj numeroj, resumojn en Esperanto de ĉiuj artikoloj. Ĝi ankaŭ enhavas la rezolucion de la Instituto de Geografio kaj Statistiko pri la enkonduko de Esperanto, kiel helpan invon.

Detala artikolo titolita "Esperanto kaj Radio" pri tiu okzintaĵo aperis sur la unua paĝo de la gazeto "O Povo".

Internacia Esperanto-Ligo

INTERNACIA KONKURSO 1939

Stato je la 31a de Marto 1939:

	Poentoj		
	Elirbazo	1939	%
1. Portugalujo	303	589	194.4
2. Finnlando	250	394	157.6
3. Jugoslavujo	694	846	122.0
4. Brazilo	429	481	112.1
5. Hungarujo	574	584	101.7
6. Britujo	6594	6007	91.1
7. Svisujo	693	605	87.3
8. Polujo	683	591	86.5

Jen la reguloj de la nunjara konkurso:

Por ĉiu membro aliĝinta al IEL estas donotaj poentoj laŭ jena tabelo:

AM — 1, MJ — 5, MA — 10, MAH — 12, MS — 15, Dumviva membro (nova) — 50, Patrono — 50, Entrepeno — 50, Vendo de kuponlibro — 5.

Kara Samideano, aliĝu al BLE kaj IEL, precipe kiel individua membro (MJ, MA, MAH, MS, DM, Pat, HM).

Novaj DELEGITOJ

Monte Aprazível (S. Paulo) — Constantino de Carvalho.

Macció (Alagoas) — S-ro Paulino Santiago. Rua Barão de Penedo, 52.

Santos (S. Paulo) — S-ro Lauro Jorge de Oliveira. Rua Baía, 57.

Manaus (Amazonas) — S-ro Sebastião Augusto. Rua Costa Azevedo, 117.

NOVA FAKDELEGITO

Belo Horizonte (Minas Gerais) — S-ro Ing. Aristoteles J. de Faria Alvim. Av. Tocantins, 545. (Industrio).

KUPOLIBRETOJ DE I. E. L.

Jam pagis al Internacia Esperanto-Ligo, pere de Brazila Ligo Esperantista, la sumon de la kuponlibretoj eldonitaj por malaperigi la deficiton de tiu Ligo:

Antaŭa listo 204*000
S-ro Lauro Jorge de Oliveira 25*000

Sumo 229*000

DELEGITARO EN BRAZILIO

Komitatano	— 1, Cefdelegito — 1		
	D.	VD.	FD.
Rio-de-Janeiro	—	—	8
Amazonas	1	—	—
Ceará	1	1	2
Rio G. do Norte	1	—	—
Pernambuco	1	1	4
Alagoas	2	—	—
Baía	4	—	1
Est. do Rio	1	—	—
São Paulo	5	1	3
Rio G. do Sul	1	—	1
Minas Gerais	3	—	2
Goiaz	1	—	—
Sumo	21	3	21

PATRINOJ

COELHO NETO

— Ne gravas la nokta vetero. Mi ĝin kunportos bone ŝirmite. Nun ne pluvas; nur ventas.

— Sed estas pluvonte.

— Eble frumatene pluvos.

— Kioma horo estas?

— Jam sonis la dek-unua. Sed rapidu.

— Baldaŭ ĝi finos mamsuĉi.

— Ha! Se vi komenciĝas per larmoj...

— Tio estas tute natura, panjo. Ĉu mi ne devas senti? Eĉ la arboj, se oni elŝiras el ili branĉon, ploras veraĵn larmojn.

— Ja. Tamen demandu al ĝia patro, ĉu li memoras pri ĝi.

— Ĝia patro estas al mi indiferenta! Mi bone scias ke li ne memoras pri ĝi, eble li ne scias, ke ĝi jam ekzistas. Sed mi estas patrino. Estas en mi, kie ĝi ĝermis, kaj el mi ĝi naskiĝis. Mi ĝin tenis, dum naŭ monatoj, sub mia koro kaj estis la koro, kiu ĝin lulis per sia batado, tage kaj nokte. Fine mi kutimiĝis ĝin senti. Ĉu mi ne devas plori? La doloro, kiun mi sentis, estis la prezo, per kiu mi ĝin pagis al la vivo. Ĝi estas mia, tute mia. Kaj rigardu, panjo, ĉu ne doloras perdi tiel belan infanon! Ĝiaj grandaj okuloj malfermitaj kaj tiel senkulpaj estas brilantaj lumoj. La pupiloj ŝajnas plenaj de mirego: ili ankoraŭ estas kvazaŭblindigitaj pro la brileco de la Paradizo. La en ĝiaj pupiloj loĝantaj anĝeletoj ankoraŭ ne kutimiĝis al la mondo. La infanetoj estas tre malfortaj kaj eniras en la vivon nur defenditaj de sia propra malforteco: ili ne parolas por petegi, ne marŝas por forkuri — ili ploras, ridegas, gestas per siaj braketoj kvazaŭ serĉante la altaĵon, kiu estas la ĉielo; nenion pli ili faras. Se la patrinoj ne defendos ilin, kio okazos al ili? Certe oni metos ilin en la turniĝan keston por forlasitaj infanoj...

— Multaj tien jam eniris. Ĝi ne estas la unua. Riĉaj patrinoj ankaŭ tien metas siajn infanojn.

— Ili ne estas patrinoj.

— Ha! ili ne estas patrinoj... Sed, kiu parolis pri ĝia forlaso?

— Jes, estis mi, antaŭ ol ĝin vidi. Nun...

— Kaj kiel vi povos ĝin nutri?

— Mi havas laktoplenajn mamojn.

— Kaj poste?

— Poste, mi donos al ĝi mian sango, se necese.

— Paroloj. Pano kostas ŝviton kaj larmojn.

— Ne mankos al ĝi panb. Mi neniam imagis, ke mi tiel ĝin amus! Estis necese, ke oni volus ĝin forpreni, por ke

mi sentus, ke ĝi estas ligita al mia koro, kiel la arboj al la tero, kie ili kreskas.

— Sola, vi povos vivi facile; kun ĝi... Mi ne scias. Filo donas al la virino ŝajnon pli maljunecan ol la sulkoj kaj la blankaj haroj.

— Mi vivos kun ĝi, panjo. Rigardu kiel ĝi dormas. Ĉu ne estas krucleco forporti ĝin dormanta? Rigardu — la dormo igas ĝin pli bela. Kiel ĝi dormas, la bedaŭrinduleto! Kun siaj malfermitaj braketoj ĝi ŝajnas karna kruceto.

— Do, vi ne volas?

— Mi ne povas. Estu laŭ la volo de Dio. Forpeli ĝin... Kaj la konscienciproĉo? Suferonte, mi preferas la laboron al la turmento. Ne scii, kie ĝi estas, imagante ke ĝi kreskas inter nekonatoj, sen karesoj, demandante Dion pri sia malfeliĉo, aŭdante la patrinan nomon diritan de aliaj buŝoj, kaj ne sentante ĝian guston, ne! La orfo estas estulo perdita en la mondo; la forlasito estas pli bedaŭrinda — ĝi estas malŝatata en la vivo. La unua estas heredaĵo de mortinto, la alia forlasaĵo de la indiferenteco. La orfo havas tombon, sur kiu ĝi povos plori; la forlasito eĉ tion ne havas. Ĝi estas mia ido. Ni kunvivis, ni dividis la suferon. Vi certe amos ĝin. Ni laboros por ĝi, ĝis ĝi fariĝos plenkreskinta homo kaj pli poste...

— Vi ricevos la pagon.

— Se ĝi ne respondos al mia dediĉo per la amo, restos al mi la konsolo povi nomi ĝin mia infano. La arbo nenion petas al la frukto kaj, se oni ne ĝin rikoltas, nur post ĝia putriĝo ĝin forlasas. La aŭtuno fekundigas kaj pasas, la arbo ne plendas kontraŭ la forlaso. Mi pekis, do tio estu la puno de mia peko. Mi parolis pri forlaso, jes, mi parolis, sed antaŭ ĝia naskiĝo. Ia afero estas diri kaj alia fari. Ĉu vi iam pensis forlasi min?

— Vi havis patron.

— Tiu ĉi ne havas, tial mi devas pli ame ĝin defendi. Dio komprenis, ke miaj du brakoj sufiĉas por ĝin subteni kaj ili sufiĉas. Nun mi sentas min pli forta, pli kuraga. Kiu havas trezoron, igas avara kaj kuraga — nur la mizeruloj dormas sub libera ĉielo, ĉe la plej proksima angulo ne timante la ŝtelistojn.

— Do, vi jam decidis ĝin nutri?

— Jes, mi decidis.

— Tiel estu. Tio, kion mi diras al vi, estas nur, ke vi pentos pro tio. Vi estas tre juna kaj ankoraŭ povus aranĝi bonan edziniĝon kaj tial...

— Mi havas tion, kio konvenas al mi: mi estas patrino. Nur la patrinoj vidas la nevideblaĵon.

— Kian nevideblaĵon?

— La animon. La mia estas tie ĉi. Ĉu la filo ne estas la interna estaĵo, kiu eliras al la mondo? Kion ni dirus pri lampo, kiu forĵetus la lumecon? La lumo estas ido de la fajro. Lampo, kiu havus flamon nur por koncentriĝi en ĝi la tutan brilecon, estus nur erarlumo — kiu, estante morteliĝo, pale brilas.

— Faru, kion vi volos, sed, kiam aperos la neceso, ne lamentu apud mi. Estus preferinde forlasi ĝin nun, ol vidi ĝin poste ploranta pro malsato kaj frosto, kiam vi ne povos ĝin konsoligi.

— Kisoj tute ne mankos al ĝi.

— Kisoj...

— Estas ĉiam kompatemo por la malsato, sed ne estas kompatemo por la senkomforto. Maloftaj estas tiuj, kiuj rifuzas almozon al la malriĉuloj, sed neniu haltas por karesi senpatrinan infanon. Ŝajnas ke pluvas.

— Jes, pluvas.

— Kian nokton ĝi elportus! Kaj ĝi estas tiel bela dormante. Rigardu, panjo, mia korpo zorgegas pri la etuleto. Malmulte da tempo pasis, post kiam ĝi suĉis kaj tiel avide, ke la mamoj malpleniĝis — kaj ili jam estas laktoplenaj kaj la lakto komencas elgutiĝi kaj elflui pro la abundeco. Se la korpo tiel agas, kiel povus la animo permesi la eternan ekzilon de la senkulpuleto. Ne! La Dia kompatemo neniam mankas al la patrinoj.

— Fine... kiel farite, tiel meritite. Ĉu vi volas? Tiel estu.

— Ne estas mi kiu volas, panjo; estas ni... kaj Dio.

La pluvo klakas sur la tegmento kaj tamburas per grandaj gutoj sur la fenestro. Blovandoj dancigas la flamon de la noktolampeto.

(Tradukis A. Couto Fernandes)

1a PROBLEMO KRUCVORTO-ENIGMO

(N^o Agosto-Outubro 1938)

Jen la solvo de la problemo:

HORIZONTALE: 1) Zanzibar; 2) araneo — tb; 3) mem — dn — tro; 4) esujo — ulea; 5) ntr — Kant; 6) ha — Sokrato; 7) Ontario; 8) ft — ltr; 9) aort — ŝalou; 10) ĝojaĵon.

VERTIKALE: a) Zamenhofaj; b) arestanto; c) Namur — rg; d) zn — salto; e) Iedo — ort; f) bon — kirŝa; g) ukro — aj; h) tlaa — ilo; i) Trento — on; j) boato — en.

Klarigoj: 3) dana; 4) Jesuo; 5) nastro; 8) futo — letero; c) ruĝa; d) zono; g) kuro; h) lata.

Bedaŭrinde nenium korektan solvon ni ricevis.

Esperanto en la Teknika Gazetaro

(Daŭrigo)

La brazila klimato estas poste studata, kaj la aŭtoro distingas en Brazilo kvar ĉefajn klimatajn zonojn, nome: la vastan ekvatoran zonan, la duonsenankvan Nordorientan zonan, la marbordan zonan kaj la centran zonan, koncerne la homan agmanieron, la aŭtoro konsideras Brazilon unu el la plej grandiozaj ekzemploj de la batalo de la homo kontraŭ la klimato, precipe ĉe la nordorienta zono, kie, kontraste kun la kontraŭa klimato, la loĝatigo estas unu el la plej densaj en Brazilo.

La aŭtoro ekzamenas la brazilan hidrografian reton, kiun li konsideras unu el la plej kompletaj en la mondo, kaj elstarigas la gravan funkcion de la riveroj por la enpenetrigo en la landon, rimarkigante, ke la amerika kontinento estis, post Eŭropo, tie, kie la blankhaŭtuloj unue atingis la centrajn partojn.

Poste la aŭtoro studas la brazilan marbordon distingante la marbordajn tipojn, nome: la Nordan kun ĝiaj manglujoj, la Nordorientan kun ĝiaj rifoj, la Orientan kun ĝiaj malgrandaj klifoj (marbordaj krutaĵoj) kaj la Sudan, kie la maro kontaktiĝas kun la monto; kaj, koncerne la agadon de la homo, la aŭtoro elstarigas la gravan faktan, ke Brazilo estas esence mara lando, malgraŭ sia granda kontinenta amaso, pro tio ke sur la marborda zono plidensiĝas la plej granda parto de la brazila loĝantaro.

La vegetado estas poste objekto pri interesaj konsideroj, per kiuj la aŭtoro studas la brazilan arbaron en ĝiaj diversaj funkcioj: a) la arbaro kiel rikolta zono, donanta al la homo, pere de simpla alprenado, frukton por nutrado, konstruadajn lignojn, medicinajn produktojn kaj multajn aliajn; b) la arbaro, kultura zono, plenumante en Brazilo elstaran terkulturan funkcion, ĉar, ordinare, la starigo de terkulturo estas farata dank' al la arbaro, kiu malaperas por doni lokon al fruktodona kampo; c) la arbaro produktanta brulaĵon, kiu estas grava funkcio por la lando, kiu ne havas provizon da abunda kaj bona karbo, nek da tavoloj el benzino.

La aŭtoro finas la unuan ĉapitron de sia monografio komentariante la strangan faktan, ke Brazilo, estante lando dotita de tiom da abundaj arbaraj provizoj, ne ĝeneraligis la uzadon de la lignaj domoj kaj tiun ĉi alian ne malpli strangan, ke Brazilo ankoraŭ importas lignojn el eksterlando, kaj laste li konsilas, ke tiu ĉi lando adoptu politikon de replantigo de taŭgaj kaj diversspecaj arboj.

(El la "Brazilia Revuo de Geografio").

LIBROJ POR LA LERNADO DE ESPERANTO

BRAZILIO

	jaro	ekz.
Primeiras lições de Esperanto (de Th. Cart). Tradução de A. Caetano Coutinho. 1a edição	1904	1.000
Primeiras lições de Esperanto (de Th. Cart). Tradução de A. Caetano Coutinho. 2a edição	1906	1.000
Primeiro Manual da Língua Esperanto. Murilo Furtado	"	1.000
Gramática da Língua Esperanto. Alberto A. Vieira e Leonel Gonzaga da Fonseca. 1a edição	"	1.000
Complemento à Gramática acima	"	1.000
Primeiras lições de Esperanto (de Th. Cart). Tradução de A. Caetano Coutinho. 3a edição	1907	1.000
Gramática da Língua Esperanto. Alberto A. Vieira e Leonel Gonzaga da Fonseca. 2a edição		1.000
Vortaro Esperanto-Portugala. Tobias R. Leite	1909	2.000
Esperanta Radikaro kun Portugala traduko. 1a eldono	"	2.000
Pequeno Guia de Conversação. Tobias R. Leite	"	2.000
Método Teórico e Prático de Esperanto. H. Rivereto	1911	1.000
Dicionário Português-Esperanto. Tobias R. Leite	1913	2.000
Curso Elementar de Esperanto. M. Mendes e C. Fernandes	1914	2.000
Esperanta Legolibreto	1917	1.000
Vortareto Esperanto-Portugala. A. Couto Fernandes	1918	1.000
Gramática Elementar de Esperanto. A. Couto Fernandes e H. Mota Mendes. 1a edição	1922	1.000
Esperanta Radikaro kun portugala traduko. A. Couto Fernandes. 2a eldono	"	1.000
Gramática Superior de Esperanto. Aluizio G. da Costa Barros	1924	1.000
Exercícios adaptados à Gramática Elementar de Esperanto. A. Couto Fernandes e H. Mendes.	1928	2.000
Estudo do Esperanto. Kverko	1932	1.000
Dicionário Português-Esperanto. A. Couto Fernandes, Carlos Domingues e L. Porto Carreiro Neto	1936	2.000
Prospekto de propagando. La 16 reguloj kaj la afiksoj	"	2.000
Gramática Elementar de Esperanto. A. Couto Fernandes e H. Mota Mendes. 2a edição	1937	2.000
Curso prático inicial da língua Esperanto. Ludoviko Rozkolora.	"	1.000
Primeiro Manual de Esperanto. (Tradução da brochura francesa "Premier Manuel de la langue auxiliaire Esperanto, com acréscimos"). Ismael Gomes Braga	"	10.000
Esperanto sem mestre. Ismael Gomes Braga	"	6.000
Método de Esperanto. Ismael Gomes Braga	1938	3.000
Esperanto-Modelo. Livro de leitura. Ismael Gomes Braga.	"	3.000
Esperanto (Essência e futuro da língua internacional — original e tradução, etc.) Ismael Gomes Braga	"	3.000
Curso Fundamental de Esperanto (Curso laŭ la Fundamento de Esperanto, por hispanlingvanoj). D-ro Jaime Scolnik e Ismael Gomes Braga	"	5.000
Manual de Esperanto (Lernolibro por hispanlingvanoj) D-ro Jaime Scolnik e Ismael Braga	"	2.000
Esperanto. La plej rapida Metodo. Paulo Menezes	"	1.000
Vocabulário Esperanto-Português. A. Couto Fernandes.	"	1.000
Exercícios de Esperanto. A. Couto Fernandes, H. Mota Mendes e Ismael Gomes Braga	1939	1.000

REVISTA BRASILEIRA DE GEOGRAFIA

(Brazilia Geografia Revuo)

Trimonata publikigaĵo kun resumo en Esperanto de la ĉefaj artikoloj. Eldonita de la *Nacia Instituto de Geografio*, fako de la *Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko*.

Ĉiu numero: 5\$000 aŭ 5 poŝtaj respondkuponoj.

**Adreso: Avenida Augusto Severo, 4
RIO DE JANEIRO BRASIL**

BRAZILA KRONIKO

AMAZONAS. *Manaus* — Artikoloj de S-ro Sebastião Augusto aperis en la ĵurnalo "Diário da Noite". Li fariĝis delegito de I. E. L.

CEARÁ. *Portalezal* — La 14a de Aprilo estis la naskiĝa datreventago de d-ro Demócrito Rocha, direktoro de la gazeto "O Povo" kaj delegito de I. E. L. Liaj lernantinoj, kiuj ĵus fondis la "Katolikan Esperantistinan Klubon", ĝin rememorigis per meso farita ĉe la Preĝejo de N. S. de la Rimedoj, dum kiu ili kantis religiajn kantojn. Nokte okazis esperantista disradiado pere de la stacio de "Rádio Clube do Ceará" — PRE-9, pri kiu ni detale parolas aliloke.

Ankaŭ la ĝelernantoj de lia alia kurso — Esperanto-kurso D-ro Zamenhofonis al li simpatian pruvon. Je la 20a horo ili venis al lia hejmo por lin saluti. Parolis en Esperanto, en la nomo de siaj gekolegoj, f-ino Wanda Sidou, vicdelegitino de I. E. L.

"O Povo" aperigis sur la unua paĝo artikolon pri tiuj festoj titolitan "Esperanto kaj Radio".

"Prokrastita ne estas perdita" diras la proverbo. Tial ni sendas nun niajn korajn gratulojn al d-ro Demócrito Rocha.

"O Povo" transskribis la artikolon de d-ro E. Backbeuser pri nia kara majstro Zamenhof kaj aperigis ties portreteton.

Tre bonan propagandon faris la gazeto "O Estado", kiu publikigis tradukon faritan de d-ro Demócrito Rocha de artikolo aperinta en "Internacia Pedagogia Revuo", oficiala organo de "Tutmonda Asocio de Geinstruitoj Esperantistaj" (TAGE), kies adreso estas la jena: Schoolstraat 13, Veendam, Nederlando. La artikolo, kiu okupas pli ol unu paĝon de la gazeto, havas la jenan titolon: "La lernado de desegno ĉe la Unuagrada lernejo" kaj estis verkita de s-ro David Ruting.

PERNAMBUCO. *Recife* — Daŭrigis sian laboron por nia afero la estraro de "Pernambuka Esperanto-Asocio". Plialtigis sian kategorion s-roj Tomaz Vila Nova kaj Odilon Vidal de Aranjó. Nun ili estas MA. Imitindaj ekzemploj.

ALAGOAS. *Maceió*. — La malnova kaj tre kompetenta esperantisto S-ro Paulino Santiago akceptis la taskon esti delegito de niaj Ligoj.

"Jornal de Alagoas" aperigis interesan intervjunon, kiun unu el ĝiaj redaktoroj, s-ro Ulisses Braga Junior, havis, en Rio-de-Janeiro, kun s-ro Rogério Pongetti, kunsocietano de la konata firmo Fratoj Pongetti, kiu presas nian

gazeton "O Brasil Esperantista" kaj jam presis multajn librojn en kaj pri Esperanto. La intervjuo preparolas pri la libroj eldonitaj de la firmo, nome: verkoj de brazilaj aŭtoroj kaj tradukoj de eksterlandaj verkistoj faritaj precipe de d-ro Carlos Domingues.

S-ro Rogério Pongetti diris, ke la eldonejo intencas estonte eldoni en Esperanto tradukojn de famaj brazilaj verkistoj. Jen liaj paroloj: "Ni uzos Esperanton kun la celo akiri per ĝi la mondan merkaton al la brazilaj verkistoj". Bela programo! Kiam ĝi fariĝos realaĵo?

BAIA. *Salvador* — Transloĝiĝis al tiu ĉi ĉefurbo nia fervora samideano d-ro Frederico de Castro Menezes, kiu fariĝis delegito de I. E. L. por medicinaj aferoj.

Mortis la patro de nia sindona samideano d-ro Jaddo Couto Maciel. Niajn korajn kondolencojn!

"Esperanto Grupo de Baía" eldonis belan ŝirkalendaron kun la portreto de D-ro L. L. Zamenhof.

Santo Amaro — Aligis al niaj Ligoj d-ro Antenor Farias Muricy, ano de "Esperanto Klubo de Santo Amaro". Ĉiunmerkrede funkcias kurso direktata de prof. Gustavo Viana.

La loka gazeto "O Município" aperigis longan artikolon pri D-ro Zamenhof kaj Esperanto en la lernejoj.

Alagoinhas — Malfermiĝis la kurso de Esperanto ĉe la Normala Lernejo, pri kiu ni parolis en nia antaŭa numero. Ĝia instruisto, s-ro Carlos Cunha, donis sian unuan lecionon je la 30a de Marto. Al la prezidanto de B. L. E. li skribis jene: "La enskribigo atingis 43 ĝelernantojn, nome, ĉiujn el la tri normalaj klasoj. Inter la geknaboj kaj kun kajereto kaj kraĵono en mano sidigis la direktoro mem de la kolegio, Prof. A. Camargo, kaj ties sekretariino, instruitino Alice Gomes. Aliaj geinstruitoj ankaŭ partoprenis." La direktoro jam ricevis kelkajn dekojn da gratulaj leteroj kaj poŝtkartoj el ok landoj!

Baldaŭ fondiĝos "Alagoinhas" a Kulturo-Centro, kie funkcios kurso de Esperanto.

"Correio de Alagoinhas" aperigis artikolon pri la dua eldono de la romano de d-ro Valienne "Ĉu li?", kiu estis eldonita de "Literatura Mondo", en Hungarujo, kaj presita en Ĉinujo!

"Jornal de Alagoinhas" publikigis artikolon de S-ro Ismael G. Braga titolitan "Interne kaj ekstere".

"O Popular" deklaris, ke ĝi donas

sian apogon al Esperanto kaj jam aperigis kelkajn notojn por tiu helplingvo.

STATO RIO-DE-JANEIRO. *Porto das Flores* — F-ino Ilka Furtado Figueira, lernantino en la kurso per korespondado, promesis aligi al B. L. E. kaj, dum la monato Junio, viziti ties sidejon.

STATO SÃO PAULO. *São Paulo* — S-ro Osvaldo Leite de Moraes, sindona delegito de niaj Ligoj, daŭrigas sian sabatan kurson kaj komencis gvidi kursojn per korespondado. Ĉar li nun laboras tage kaj studas nokte, li ne povas vigle labori por Esperanto, laŭ sia forta deziro. Ni esperas, ke la aliaj kunestraranoj ne ŝenkuraĝiĝos kaj kunlaboros kun li. Sen laboro oni ne povas atingi la deziratan celon. Antaŭen!

Santos — Pagis siajn kotizojn al niaj Ligoj S-roj prof. Lauro Jorge de Oliveira, kiu ankaŭ fariĝis tiea delegito, Rodolfo Schmidt kaj Pascoal Heumann, ĉiuj anoj de "Centro Esperantista de Santos".

Baurá — Fariĝis delegito S-ro Leonidas Silva, kies nuna adreso estas: Rua 1.º de Agosto. Vila Noroeste Nº 7.

Monte Aprazível — Artikolo pri la lasta numero de "O Brasil Esperantista" aperis en la loka gazeto "A Cidade".

Santo André — S-ro M. Garcia Rodrigues, kiu estis ano de B. L. E., direktas nun kurson de Esperanto, kiun ĉeestas kelkaj knaboj. Ni esperas, ke li realiĝos al nia Ligo.

Jaboticabal — La 28an de Februaro okazis ordinara kunsido de "Jaboticabal Esperanta Klubo", sub la prezido de S-ro Genesio Pereira Filho. La 14an de Marto okazis eksterordinara kunsido, dum kiu oni ŝanĝis la nomon de la klubo, pro tio, ke ĝi plivastigis sian agadon rolan. Tial ĝi fariĝis "Kultura Societo de Jaboticabal", kiu havos oficialan trimonatan organon nomatan "Kulturo". La nova societo konsistas el diversaj fakoj, el kiuj unu por la propagando de Esperanto. Ĝia sidejo estas ĉe "Instituto Popular de Ensino", Rua Rio Claro, 32.

La lokaj gazetoj "O Democrata", "A Notícia" kaj "O Combate" publikigis detalajn informojn pri tiuj okazintaĵoj. "O Democrata" ankaŭ recenzis pri kelkaj libroj, kiujn ĝi ricevis. "Diário de Jaboticabal" kaj "Voz Operária" publikigis kelkajn notojn pri Esperanto.

Tiuj societotoj eldonis kelkajn foliojn kun la celo propagandi la lastajn verkojn de Esperanto. Dankojn pro la ekzempleroj senditaj al nia Ligo.

RIO GRANDE DO SUL. — *Porto Alegre.* Benjamin Camozato en unu el

siaj artikoloj publikigataj en la ĵurnalo "Correio do Povo" preparolas pri la Internacia Filatelio Ekspozicio, kiu sub la nomo CYTRA estos inaŭgurata la 12an de Majo en Buenos Aires, ĉefurbo de Argentino. La propagando de CYTRA estis farata en la lingvoj hispana, portugala, franca kaj angla. D-ro Camozato bedaŭras, ke la Organiza Komitato ne uzis Esperanton, kiel faris kun granda profito tiu okazinta en Rio-de-Janeiro sub la nomo BRAPEX. Li estas prava. Nun preskaŭ ĉiuj internaciaj foiroj kaj ekspozicioj, eĉ la *Pariza Foiro*, uzas la helplinvo Esperanto por siaj propagandoj eksterlande.

MINAS GERAIS. *Belo Horizonte* — Dum sia kelktaga restado en tiu ĉi ĉefurbo D-ro Carlos Domingues, vicprezidento de B. L. E. kaj komitatano de I. E. L., vizitis niajn fervorajn samideanojn s-ron Wilson Veado kaj ing. Aristoteles J. de Faria Alvim, kun kiuj li interparolis pri la fondo de esperantista klubo, kiu baldaŭ fariĝos realaĵo. D-ro C. Domingues ricevis tre bonan impreson pri la entuziasmo kaj ĝentileco de tiuj esperantistoj.

RIO-DE-JANEIRO — La 4an de Marto okazis ordinara kunsido de "Brazila Klubo Esperanto", dum kiu oni decidis organizi tekunvenojn aŭ promonadojn, por ke la klubanoj havu okazon praktiki la lingvon, kaj sendi telegramon al la Nacia Konsilantaro de Geografio, per kiu oni ĝin gratulos pro la apero de la "Brazila Geografia Revuo" kaj dankos pro la uzado de Esperanto en la resumo de ĝiaj artikoloj.

S-ro A. Couto Fernandes daŭrigis siajn tri kursojn, kiuj funkcias ĉe la Geografia Societo kaj la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. La glernantoj de tiu ĉi kurso havis la agrablan surprizon ricevi la viziton de nia tre kara samideano Pastro Agostino Stellacci, kapelano ĉe la itala vaporŝipo "Conte Grande".

Artikolo de d-ro Domingues Barbosa pri la lasta numero de "O Brasil Esperantista" aperis en la multelegata ĵurnalo "Jornal do Brasil". Liaj artikoloj, kiuj aperas ĉiutage sur tre bona loko de tiu ĵurnalo, estas tre ŝatataj. Multajn poresperantajn artikolojn ni jam ŝaldas al tiu klera profesoro.

Li finis sian lastan artikolon per la jenaj vortoj: "Kaj estas bone vidigi, ke "O Brasil Esperantista" redaktita en la portugala lingvo kaj en Esperantoto, estas plia evidenta pruvo, ke la lingvo de Zamenhof tute ne celas esti ĝi la spiriton pri naciismo, ĝigante la "ekskluziva" lingvo de ĉiuj popoloj, sed kontraŭe ĝi serĉas esti nur la "dua lingvo" de ĉiuj nacioj faciligante pli

bonan interkomprenon inter ĉiuj rasoj".

Ilustrita per belega portreto de nia kara Majstro la revuo "Beira Mar" publikigis interesan artikolon de Ismael Gomes Braga.

Alia artikolo de tiu ĉi sindona esperantisto, titolita "Nekredeblaj veraĵoj" aperis en "Reformador", oficiala organo de la Brazila Spiritista Federacio, kiu ankaŭ publikigis notojn kaj recenzojn pri Esperanto.

Aliĝis al B. L. E. kaj I. E. L. F-ino Rosa Amaral Malheiro kaj Prof. José Joaquim da Trindade Filho.

CONGRESSOS ESPERANTISTAS

Durante o corrente ano realizar-se-ão os seguintes congressos internacionais e nacionais:

31º Congresso Universal de Esperanto, em Berne, Suíça, de 29 de Julho a 5 de Agosto. Endereço: 31a Universala Kongreso de Esperanto, Bern, Svisujo.

21º Congresso da União Internacional de Católicos Esperantistas (IKUE), em Antuérpia, Bélgica, de 5 a 11 de Agosto. Endereço: 21a Kongreso de IKUE, Potgieterstraat 1, Antwerpen, Belgujo.

19a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), em Kobenhavn, Dinamarca, de 5 a 10 de Agosto. Endereço: S-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, Kobenhavn K., Danlando.

28º Congresso Esperantista Belga, em Leuven (Louvain), de 27 a 29 de Maio. Endereço: 28a Belga Esperanto-Kongreso, Hotel Rattenman, Leuven, Belgujo.

30º Congresso Esperantista Britânico, em Weston-super-Mare, de 26 a 29 de Maio. Endereço: S-ro Lionel H. May, 288 The Boulevard, Weston-super-Mare, Somerset, Anglujo.

24º Congresso da Federação de Trabalhadores Esperantistas no Território de língua holandesa (FLE), em Arnhem durante a Páscoa. Endereço: P. Rosseel, Spijkerstraat 295, Arnhem, Nederlando.

10º Congresso da Liga Flamenga Esperantista, em Antuérpia, de 27 a 29 de Maio. Endereço: Loka Kongresa Komitato de la Ioa, Stefaniestraat, 44, Antwerpen, Belgujo.

2º Congresso de Esperanto do Norte da França, em Fresnes-sur-Escaut, de 13 a 14 de Maio. Endereço: S-ro Ninauve, 75, rue Emile Zola, Fresnes-sur-Escaut, Nord, Francujo.

27º Congresso Esperantista Japonês, em Osaka, Japão, de 29 a 30 de Abril.

12º Congresso Ingoslavo de Esperanto, em Karlovac, de 28 a 29 de Maio. Endereço: Esperanta Klubo, Haulikova 7, Karlovac, Ingoslavujo.

Congresso Jubilar dos Esperantistas Lituanos, em Kaunas, de 17 a 19 de Junho. Endereço: Litova Esperanto-Asocio, Zemaičiu 15, Kaunas, Lituania.

11º Congresso Esperantista Holandês (LEEN), em Rotterdam, de 8 a 10 de Abril. Endereço: C. Baksteen, Willem Buytewechstr 225 c. Rotterdam, Nederlando.

OS FATOS

A partir de Março a estação rádio de Roma EIAR dispõe de dois transmissores para irradiações em onda curta, que são feitas em Esperanto às segundas-feiras e aos sábados.

A estação rádio de Sofia, capital da Bulgária, está irradiando, a partir do mês de Março, preleções em Esperanto.

Fundou-se um clube esperantista em Vardo, na Noruega, a cidade européia mais próxima do Polo Norte.

Fundou-se em Varsóvia, capital da Polónia, a Liga Internacional de Surdos-Mudos, cujo fim é fazer propaganda do Esperanto entre os surdos-mudos. Endereço: S-ro S. Schonberg, ulica Leszno 4m 15, Warszawa, Polando.

A direção da Feira Internacional de Budapeste, Hungria, usa regularmente o Esperanto para a propaganda de suas feiras anuais e para informação aos visitantes. Para a feira do corrente ano, que se realizará de 28 de Agosto a 8 de Maio, foram editados belos cartazes e selos de propaganda. 4

A gazeta mensal "The Linguist", editada pela "The Linguists' Club" (84 Kingswau, London, W. C. 2., Inglaterra) e redigido em 5 línguas nacionais (francês, inglês, alemão, espanhol e italiano), está publicando agora uma parte em Esperanto. O fim da gazeta é fornecer aos leitores material de exercício para a prática das línguas mencionadas.

Kongreso de Esperanto-Asocio en Ĉ. S. R.

okazos pentekoste (28-30.5.) en Praha. Eksterlandaj gastoj estas kore invitataj. La organo de EAĈSR, "Ligilo", denove aperas, kaj la redakcio klopodos aperigi ĝin pli regule. La unua artikolo post la reapero estis dediĉita al la granda mortinta verkisto Karel Čapek. Germana klubo "Verda Stelo" en Praha disigis kaj transdonis sian tutan havaĵon al EAĈSR. LA membroj de EAĈSR subtenas sian asocion ne nur morale sed ankaŭ finance; la listo de donacintoj atingis jam sumon de preskaŭ 1250 kronoj. Ĉiumarde okazas amikaj kunvenoj post 20 h. (Praha II, Truhlářská 16, kie ĉiutage dejoras ofiĉisto de 14-18 h., escepte de dimanĉoj kaj festotagoj).

Nepre ĉiuj esperantistoj kaj ĉiuj

E-entrepreno

aliĝu al la 14-a eldono de

BES-ADRESARO

ke ĝi estu vera kaj kompleta bildo de E-movado!

La malgranda aliĝa kotizo - 6\$000 (kun portreto - 10\$000) - ebligas al ĉiu la aliĝon kaj rajtigas al senpaga ricevo de adresaro kun valoraj informoj, gravaj por ĉiu esperantisto!

Sola publikigo de la adreso devigas al nenio!



Poŝtkarto eldonita de Brazila Ligo Esperantista okaze de la Espozicio.

Kiu sendos du poŝtajn respondukuponojn al Brazila Ligo Esperantista (Praça da República, 54, Rio-de-Janeiro, Brazilo), ricevos poŝtkarton afrankitan per la Orjubilea poŝtmarko kaj stampitan per la stampo kun verda stelo.

Kiu sendos tri poŝtajn respondukuponojn ricevos la samon en fermita koverto.

LIVROS EM E SOBRE ESPERANTO

Gramática elementar de Esperanto, de A. Couto Fernandes e H. Mota Mendes	4\$000
Vocabulário Esperanto-Português, compilado por A. Couto Fernandes	2\$000
Exercícios de Esperanto	1\$000
Coleção dos livros acima	6\$000
Esperanto sem mestre, de Ismael Gomes Braga, brochura	4\$000, enc. 6\$000
Primeiro Manual de Esperanto, compilado por Ismael G. Braga	2\$000
Metodo de Esperanto, compilado por Ismael G. Braga, broc. 5\$, enc.	7\$000
Esperanto-Modelo, livro de leitura, compilado por Ismael G. Braga, br.	5\$000
Essência e futuro de Língua Internacional, de dr. Zamenhof, tradução de Ismael G. Braga	4\$000
Esperanto (original da tese de Dr. Zamenhof com a tradução de Ismael G. Braga)	4\$000
“Esperanto com mestre” com discos de pronúncia	40\$000
Fundamenta Krestomatio, de Dr. Zamenhof, br. 16\$, enc.	20\$000
Plena vortaro, de Prof. E. Grosjean-Maupin, encadernado	60\$000
Chave do Esperanto, dúzia 10\$000, uma	1\$000
Curso elementar de Esperanto, por Saldanha Carreira e Luzo Bemaldo	10\$000
Amo per proverboj (Amor por anexins), de Artur Azevedo, tradução de A. Couto Fernandes.	2\$000
Veterano?, de Ismael G. Braga, broc. 5\$000, enc.	7\$000
Dicionário Português-Esperanto, compilado por A. Couto Fernandes, Carlos Domingues e Luiz Porto Carreiro Neto, cart. 25\$000 enc.	30\$000
O Rádio em 16 Palestras, de E. Aisberg, trad de A. Couto Fernandes e Carlos Domingues.	12\$000
Gajaj Horoj, de C. Walter	4\$000
Encomendas à Brazila Ligo Esperantista — Praça da República, 54, Rio-de-Janeiro. Os sócios da Liga teem direito a um abatimento de 10%. As importâncias inferiores a 20\$000 devem ser acrescidas de 10% para o porte e registro.	
Curso por correspondência, elementar	20\$000
” ” ” , superior	30\$000

Kara Samideano!

La fremdultrafika ofico de la urbo PÉCS, eldonis gvidlibron kaj leter-paperojn esperantlingvajn. Tiuj ĉi belegaj propagandiloj estas SENPAGE riceveblaj de:

IDEGENFORGALMI HIVATAL PÉCS. Hungarujo.

SPECIALA PREZO POR LA GRUPOJ

FILIITAJ AL B.-L. E.

10 Kolektoj (Gramática elementar de Esperanto, Vocabulário Esperanto-Português, Exercícios).

50\$000

ANUÁRIO BRASILEIRO

DE

LITERATURA

1939

Ilustrado — 520 Páginas

contendo artigos de propaganda do Esperanto

Preço — 15\$000

IRMÃOS PONGETTI

AV. MEM DE SA, 78. Rio-de-Janeiro

O RÁDIO em 16 palestras

(E. Aisberg)

Traduzido do Esperanto por A. COUTO FERNANDES

E CARLOS DOMINGUES

2.^a EDIÇÃO EM PORTUGUÊS

Preço 12\$000

Editores — Irmãos Pongetti

Encomendas à Liga Esperantista Brasileira

ANONCOJ

Paĝo	100\$000	5 dolaroj
Paĝduono	60\$000	3 ”
Paĝkvarono	40\$000	2 ”
Paĝokono	30\$000	1 dolaro
Anonceto (du linioj) — 3 poŝtajn respondukuponojn.		

“O Brasil Esperantista” petas al la estraroj de 1’ brazilaj kluboj kaj al la brazilaj delegitoj de I. E. L., ke ili sendu monatan raporton pri siaj propagandaj kaj instruaj laboroj.

KIU DEZIROJ ABONI AL LA SEMAJNA GAZETO “HEROLDO DE ESPERANTO” DUM 6 MONOTOJ (Majo - Oktobro), SENDU AL BRAZILA LIGO ESPERANTISTA LA SUMON DE 20\$000